KONGRESA KURIERO DE LA 101-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

# Pribina

Dimanĉo, 31 julio 2016 Speciala – postkongresa numero

## Nia "ora duopo"



Ni tie ĉi ne troigas. Petro kaj Dorota famiĝis vere tutmondskale. Se ni volus taksi ilian laboron por la 101-a Kongreso, ni simple venus al la ekkono, ke Esperanto ne havas sufiĉe da sufiksoj por esprimi la veran kvaliton ĉi-konekse: se ni konstatos, ke la laboro farita de ili estis grandega, tio ne sufiĉas kaj la sufikso *-issim-* ne estas Esperanta, do restas al ni unununura ebleco – signi ilian laboron kiel grandegegan! Sen kia ajn fanfaronado – ilia laboro tre sukcese prezentis Slovakion al la monda esperantistaro kiel etan grandan landon meze de Eŭropo. La nesufiĉon de dormado kaj senfinajn streĉojn ili certe ne bedaŭras. Ili vere meritas nian gratulon kaj sinceran dankon! Al ilia komuna vojo de gefianĉiĝo al geedziĝo ni deziras al ili ĉion nur plej bonan, vivon plenan de feliĉo kaj amo akompanatan de firma sano!

## El la unuaj impresoj pri la UK

**Clay Magalhães** (KKS): Uzi la vorton "plej" estas ĉiam komplike, pro tio mi ankaŭ rilate al la ĵus finita kongreso ne uzas ĝin, sed sen kia ajn dubo oni povas konstati, ke la kongreso en Nitro estis vere riĉa laŭprograme. Ĝi enhavis eĉ programerojn tute novajn, kiuj vere pliriĉigis la spektron de la tuta okazaĵo. Precipe tio validas ĉe la Kleriga lundo, kiu vere fariĝis spektro de slovaka kulturo kaj scienco. Vere ĝi estis, speciale de la organiza flanko, altnivela, kelkaj mankoj okazas ĉiam, sed ili okazadis nur vere malofte. Gratulon al la tuta LKK!

**Zuzana Kožuchová**: Mi vekiĝis hodiaŭ, la 1-an tagon post la 101-a UK, kaj pripensis la tutan pasintan semajnon laŭ ĝiaj aventuroj kaj defio. Taksante nian temon de la junulara programo (Junuloj al plenkreskuloj, plenkreskuloj al junuloj), ni estas tute kontentaj. Niajn programerojn partoprenis homoj de ĉiuj aĝgrupoj kaj mi tre bone amikiĝis kun ili ĉiuj, kaj tre proksimiĝis. Se mi taksas la sukceson de nia organizado, mi kredas, ke mi faris, kio estis en miaj povoj kaj konsiderante la malgrandan kvanton de ni, estis nefacila laboro. Ĝenerale mi fieras pri niaj atingoj kaj mi ege ĝuis la kongreson, mi eĉ ne imagis, ke estos tiel agrabla komuneca etoso. Ni senpacience atendos la sekvan similan okazon.

**Peter Holba**: Mi pensas, ke UK estis ne nur plena de diversaj fakaj kunsidoj kaj prezentoj, sed ankaŭ plena de amuzado, koncertoj, teatraĵoj, ekspozicioj, kiuj plezurigis la ĉeestintojn. En multaj ekskursoj ni sukcesis prezenti nian landon kaj urbon kaj ĉiuj certe memoros nin.

**Miroslav Hruška**: Mia unua UK estis ligita kun volontulado – mi prizorgis ĉefe teknikaĵojn en prelegejoj. Mi kompreneble povis ankaŭ ĉeesti plurajn kulturajn eventojn, babili kun multaj amikoj kaj ankaŭ malkovri belecojn de la urbo. Do mi tute ne bedaŭras, ke mi decidis veni al la UK en Nitra.

# Lingvopolitike dum 2 tagoj



*Mark Fettes transdonas al la komisionano de EU Vytelis Andriukaitis naŭlingvan memorlibron*

Dum ĵaŭdo kaj vendredo (28/29 de julio) okazis sub aŭspicio de ministro por eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de SR Miroslav Lajčák en la Pedagogia Fakultato de la Universitato de Konstanteno la Filozofo en Nitro (organizita fakte de la Fakultato de mezeŭropaj studoj) lingvopolitika konferenco sub la nomo Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio. Partoprenis ĝin fakuloj el diversaj universitatoj. La enkondukan alparolon prezentis en Esperanto komisionano de EU Vytelis Andriukaitis. Oni laboris en tri sesioj, uzante tri laborlingvojn: la slovakan, anglan kaj Esperanton. Necesas akcenti la altkvalitan laboron de interpretistoj, kiuj glate kaj altprofesie kontribuadis al la bona fluo de la programo. Vendrede antaŭtagmeze oni post detala diskuto akceptis tri rezoluciojn kun rekomendoj al ŝtataj organoj de la landoj de EU en la sfero de internacia lingva komunikado, kun akcento al la lingva justeco, kio malfermas la rolon de la uzo de Esperanto en ĝi.

# Grandioza marŝo tra la urbo

La Nitranoj havis vendrede antaŭvespere okazon vidi vere nekutiman eventon. Pli ol mil esperantistoj kun E-flagoj kaj transparentoj triumfe marŝis tra la urbo – de la UK-ejo tra la piedira zono ĝis la teatro de A. Bagar. Akompanataj de rulado de tamburoj, mezepoka ĉaro kun viroj en mezepokaj kostumoj, ili kreis vere bonan impreson ĉe la observantaj civitanoj de la urbo, kiuj ofte montris propran simpation al la verda marŝintaro.



# Slovaka tango mondrekorde

La vendreda vespero sur la Svätopluk-placo apartenis ĝis noktomezo al la monda esperantistaro. Ĝi komencis per la provo atingi la mondrekordon el la dancado de la slovaka tango. Post nelonga danckurso gvidita de la dancmajstro (kun bonega traduko fare de Zuzana Kožuchová) proksimume 80 dancparoj dancis la tangon pli ol 20 minutojn. Laŭ la decido de la oficiala ĵurio la mondrekordo estis agnoskita, kion atestas oficiala diplomo pri tio! Do, ni vidu, la esperantistaro estas eĉ dancema!



# Muzika vespero bunte abundis

La lastan vesperon okazis pluraj koncertoj sur la ĉefplaco. Post la slovaka tango, dum kiu slovaka bando ludis muzikon, la kongresanoj kaj la urbanoj povis ĝui koncertojn dum pluraj horoj: muzikis ne nur Kaŝi, Asorti kaj Kim Henriksen kun Martin Wiese, sed ankaŭ loka muzikgrupo Sematam.



*La loka grupo Sematam*

# La lasta tago – tago de adiaŭo

Kiel kutime, sabato, la lasta tago de la Kongreso, apartenis al la solena fermo. Do la kongresanoj venis denove al la urba halo, sed nune kun alia celo ol la antaŭan dimanĉon: adiaŭi de ĝi. La solena fermo estis tre riĉa kaj daŭris pli ol du horojn. Estis deklaritaj honoraj membroj de UEA (inter ili nia Ján Vajs – gratulon!), per minuto da silento estis estimitaj la gravaj mortintoj de la movado, venis oficialaj dankoj kun tre granda aplaŭdo por la urbestro de Nitro Jozef Dvonč kaj, ankoraŭ pli granda, por nia Peter Baláž! Tre karan impreson faris la prezentiĝo de la infanoj de IIK. En sia ferma parolado la prezidanto de UEA Mark Fettes akcentis la senton de amikeco, kiu rolis dum la tuta daŭro de la Kongreso ne nur inter la kongresanoj mem, sed ankaŭ flanke de la urba gvidantaro kaj eĉ la civitanoj de la urbo. Pro tio restas Nitro en la memoro de ĉiuj amikeca urbo. Estis deklarite, ke la 103-a UK okazos en 2018 en Lisbono (Portugalio). Fine venis la tradicia transdono de la E-flago al la reprezentantoj de la urbo Seulo (Suda Koreio), kie okazos la venontjara 102-a Universala Kongreso de Esperanto.

Do, la 101-a Universala Kongreso de Esperanto eniris en la historion, vivu la 102-a!




# Ekspozicio en Centro plilongigita ĝis la 5-a de aŭgusto



La ekspozicio en la vendejaro Centro pri diversaj sferoj de la Esperanta vivo, kiu sur dek ses paneloj montras la plej gravajn aktivecojn ĉi-kampe, precipe por civitanoj kaj vizitantoj de la urbo kun konatiga celo kaj celo de interesigo de la homoj pri Esperanto. Kiel montris la ĝisnuna daŭro de la ekspozicio, oni eĉ ne sukcesis aldoni ĉiam novajn informmaterialojn pro daŭra kaj grava intereso de la ĉirkaŭirantaj vizitantoj de la ekspozicio.

# "Paca" murpentraĵo

Kiel jam multaj scias, sur la muro de la urba banejo montriĝas grafike altnivela pentraĵo montranta simbole la pacan revon por la tuta terglobo, en la grandeco ĉ. 10×10 m, pentrita dum tri tagoj de la artisto Marek Remiš (NIOB) el Partizánske. La verda stelo ene de la terglobo



simbolas la kontribuon de Esperanto kaj ĝia movado al la atingo de la tutmonda paco. Grave estas, ke la pentraĵo restas sur la muro eĉ post la fino de la Universala Kongreso por memorigi la civitanojn de Nitro pri tiu ĉi grava evento, kies gastiganto la urbo mem estis.

## Ripoze kaj amuze dum la postkongresa vespero



Duma la unua "libera" vespero renkontiĝis ĉiuj restantaj LKK-anoj kaj helpantoj en la salono Rosa, en la studenthejmo Bernolák por iom malstreĉiĝi kaj babili pri pli trankvilaj temoj. Estis iom da ĉampano, pico kaj kelkaj dolĉaĵoj por frandemuloj. Bona muziko nur apogis la bonan humoron. Okazis tre agrabla programero: la belga esperantistino Flory Witdoeckt donacis al la ĉeestantoj kaj same al SKEF kelkajn dekojn da horloĝoj (kun Esperanta steleto), kiujn antaŭ tempo alportis al Eŭropo ĉinaj entreprenistoj okaze de grava komerca foiro, pri kiuj ŝi poste eĉ devis pagi doganon proprapoŝe. Nun ŝi bonkore donacis la kvanton de bele aspektantaj horloĝoj, kio estis akceptita kun kora dankemo. Do vere dankon al vi, Flory! Estis ĝojige!

## Ĝenerala danko de la prezidanto de la LKK

Mi tutkore dankas al ĉiuj, kiuj diversgrade kontribuis al la senduba sukceso de la unua Universala Kongreso de Esperanto sur la teritorio de Slovakio en ĝia belega historia urbo Nitro. Ne ĉiuj faris same gravan laboron, sed al neniu mankis entuziasmo kiel antaŭkondiĉo por bona rezulto. Se ni tion kunigas, ekestis rezulto, kiu plenigas nin per kontento, kiun apogas la esprimiĝoj de la plej gravaj personoj ne nur de UEA, sed ankaŭ de aliaj instancoj. Sen vi, ni tian rezulton tutcerte ne atingus. Pro tio, ankoraŭfoje koran dankon kaj ĝis revido ĉe aliaj okazaĵoj, ĉu ĉe ni hejme aŭ eĉ eksterlande.

*Via Peter Baláž*



Tiun ĉi numeron de la kuriero preparis por vi:
Matthieu Desplantes (aspektiganto) Stano Košecký (redaktoro)






**Volontuloj enkadre de la mallongdaŭra EVS, subtenitaj de la EU-programo Erasmus+**